

Viglan agadon en Israelo spronas la Azia Kongreso kaj la 125-jara Jubileo

"Ĉu Israelo ne troviĝas en Eŭropo?" estis la reago de pluraj aktivuloj de KAEM (Komisiono de Azia Esperanto-Movado de UEA), kiam antaŭ tri jaroj la novaliĝinta Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) invitis la sepan Azian Kongreson al tiu fora angulo de Azio: ĝis tiam la plej okcidenta Azia Kongreso okazis en Nepalo.

Tamen, dum la sesa Azia Kongreso en Mongolio en 2010, KAEM oficiale decidis okazigi sian sekvan Kongreson en la jaro 2013 en Israelo. Tiu decido spronis tujan entuziasmon en ELI. Oni ekplanis kiel ripeti la pozitivan sperton de la UK en Tel Avivo en la jaro 2000. La konstanta organiza teamo de la jam famiĝantaj Israelaj Kongresoj komencis labori, kvazaŭ temus pri landa kongreso iom pli granda ol kutime. Por ne kolizii kun la UK, kaj por eviti la someran varmon, la kongreso okazos meze de aprilo (18-22.4.2013), kaj kiel kongresurbo estis elektita Jerusalemo. Tiu elekto ebligis konvenan turisman kovron de la tuta lando ene de du semajnoj:

antaŭ-kongreso en la norda parto, duontagaj ekskursoj en Jerusalemo kaj apude dum la kongreso, kaj post-kongreso ĉe la Morta Maro, la sudo kaj Jordanio. La riĉa turisma programo reflektas ankaŭ la kongresan temon: "Ekologio de paco – kunvivado de homo, medio kaj naturo". Por la distra teamo estis kontraktitaj Kajto kaj denove jOmO, kiu sukcesege koncertis en la pasintjara Israela Kongreso.

La bezono informi la tutan Esperantujojn inspiris la rapidan konstruon de nova retejo por ELI en la somero de 2011. En aparta paĝo (<http://www.esperanto.org.il/ak2013.html>) iom post iom akumuliĝis la informoj pri la Azia Kongreso: unua kaj dua bultenoj, turisma programo, reta aliĝilo kaj listo de aliĝintoj. La ministerio pri turismo helpis produkti la materialon prezentatan dum la UK kaj IJK en Hanojo: mil flugfolioj kaj granda staranta afiŝo, kiun oni vidis dum la Movada Foiro kaj kurioze ankaŭ dum la Aŭkcio, kiam Humphrey Tonkin ofertis la kongres-numeron unu (aĉetis ĝin finnino). Ankaŭ la junularo vigle aktivis pro la organizado de la 69-a IJK, kiu koincide okazos samjare en Israelo.

Plian instigon donis la jubilea jaro. Kiel flagŝipan projekton por la 125-a jubileo



ELI decidis verki hebrean version de la filmo *La Universala Lingvo*, reĝisorita de Sam Green, cele al ĝia prezentado en la Israela televido. Post kelkaj monatoj da laboro la teamo (traduko: Amri Wandel, subtitoloj kaj teknika redaktado: Gian Piero Savio) kompletigis la laboron. Malnetaĵo estis projekciita en la Israela Kongreso en majo, kaj la finprodukton ni proponis al la populara programo "Roim Olam" (Novaĵoj el la mondo), kiu siatempo verkis bonegan raportojn pri la UK en Tel Avivo (<http://www.youtube.com/watch?v=ViRDlqya5rw>). Feliĉe la redaktoro de tiu programo, Yaakov Ahimeir, bone memoris la raportojn de la jaro 2000 kaj tuj ekŝatis la ideon elsendi la filmon en la 125-jubilea dato, la 26-a de julio. Bedaŭrinde pro neatenditaj gravaj novaĵoj la elsendo estis plurfoje prokrastita, ĝis fine fiksita en alia grava dato por Esperanto: la 15-a de decembro. En la prezentado de la raportajo la redaktoro salutis en Esperanto kaj menciis la datrevenon de Zamenhof, la jubilean jaron kaj la Azian Kongreson en Jerusalemo. En la Zamenhofa Vespero kaj Landa Kunveno okazanta en Tel Avivo tri tagojn poste, la ĉeestantoj aŭdis detalan raporton pri la agado de ELI dum la jaro kaj pri la planoj por la Azia Kongreso. Oni elektis novan estraron kaj spektis varian artan programon. Fine okazis vigla debato pri la estonta agado. **Amri Wandel**



La mondfama monumento de Jerusalemo – la moskeo Omar ("Kupolo de la Roko") en la Templo-Monto, vizitata de la kongresanoj. Foto: Amri Wandel